

# Kataluna Esperantisto



**NUMERO 328 (94)  
KVINA EPOKO  
OKTOBRO-DECEMBRO  
2003**

***Pakado en esperanto***

***KEA profesiigas sin***

***Grava asembleo***

***Renkontiĝo en Prada***

***Kongreso en Ceret***

***Esperanto en Vilaweb***

***Per esperanto  
en Japanio***

***Novaj libroj***

***Abonu viajn revuojn***

ASSOCIACIÓ  
Catalana  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

## **Internacia pakportalo en esperanto**

### **Intervjuo al Manel Vinyals, iniciatinto**

*Manel Vinyals kunkreis novan esperanto-entreprenon, fakte tre novtipan: internacian ret-portalon: [www.abc-pack.com/eo](http://www.abc-pack.com/eo). En ĝia lanĉo kunlaboras KEA, kiu danke al la pagataj tradukservoj povas antaŭvidi la kvalitan salton anoncitan en la lastaj du numeroj de ĉi tiu bulteno. Tial ni deziris paroli kun la protagonisto de tiu komerca aventuro kaj fine malkaŝi ĝin al niaj membroj.*



*Manel, vi estas esperantisto de jam dudek jaroj kaj entreprenisto ankaŭ delonge. Kio instigis vin nun kunigi la du aferojn?*

Dum la pasintjara vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, mi kontaktis multajn esperantistojn, kaj rimarkis, ke ekzistas landoj, kiel Ĉinio, kie esperanto kaj komercado bone kongruas. Ne ĉie, kiel ĉe ni, oni rigardas esperanton nur kiel interesan kultur-riĉigan ŝatokupon. Ĉefe dum la transnavigado de Pacifiko estis multe da tempo por cerbumi, kaj jen.



**A**tingis vin la fina numero de la jaro, en kiu iel resumiĝas la tuta agado de 2003. Temas, sendube, pri jaro multipega, kiu impetis laŭ tute ne antaŭvidita direkto post la asembleo. Manel Vinyals, unu el la du pasintjaraj mondvojaĝantoj, ĉion revoluciigis. Pri li vi povas legi sur tiuj paĝoj kaj per tio ni malkaŝas tion, kio pelis la iniciaton parte profesiigi la laboron de KEA. Ankaŭ la elnodiĝon de la laborkonkurso anoncita en la pasinta numero de nia revuo, vi trovos en ĉi tiu revuo, same kiel la progresojn en la esperanto-fako de la ret-ĵurnalo *Vilaweb*, pri kies ebligo ankaŭ Vinyals parte kulpas. Tamen tiuj instigoj ne estus progresintaj sen la engaĝiĝo de diversaj homoj: parte de la estraro, sed ĉefe ekster ĝi, ekzemple en la projektoj ABC-Pack kaj Vilaweb Esperanto. Same rimarkindas la aktiva agado sur la informa kaj kultura kampoj, de pluraj niaj membroj. Tio foje kaŭzas surprizojn, kiel la tute ne antaŭviditan sed rapide preparitan semajnfinan renkontiĝon en Prada de Conflent, kiu ne estis anoncita en nia antaŭa numero, ĉar dankinda duopo organizis ĝin en palpebruma daŭro kaj disanoncis ĝin rete. Ne tiel okazos pri nia venonta kongreso, pri kies datoj kaj unua elstara gasto vi povas jam legi sur tiuj paĝoj, kaj kiu hazarde ankaŭ okazos en nord-kataluna urbeto.

Fine, nur instigi vin al kunaktivado, ekzemple per via partopreno en la venonta grava asembleo, kies kunvokilo estas sendita kune kun ĉi tiu numero de *Kataluna Esperantisto*.

Hektor Alos i Font

---

En la artikolo “Plena feliĉo estas malfacila ...”, *Kataluna Esperantisto*, 327, p. 15 (julio/septembro 2003), mi aludis novaĵon aperintan en *Revista Española de Electrónica*. Jen la preciza referenco: REDE, oktobro 1989, p. 7. La kurso de japana lingvo por usonaj sciencistoj kaj inĝenieroj estis organizita de Massachusetts Institute of Technology.

Ramon Perera

---

En ĉi tiu numero kontribuis al la enhavo: Gemma Armadans, Karles Berga, Ramon Cardona, Norvega Esperantisto, Josep Franquesa, Ferriol Macip, Xavier Margais, Ramon Perera, Christian Pinard, Francesc Poblet, Llibert Puig, Òscar Puig, Darío Rodríguez kaj Manel Vinyals.

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la unua sekcio per n-ro 5785  
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne Agnoskitaj))

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Ret-Info, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 SABADELL (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio  
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: [kea@esperanto-ct.org](mailto:kea@esperanto-ct.org)  
Ret-paĝo: [www.esperanto-ct.org](http://www.esperanto-ct.org)  
Ret-listo: [nia\\_listo@esperanto-ct.org](mailto:nia_listo@esperanto-ct.org)

Kotizoj por la jaro 2003: Individua Abonanta Membro 25 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 50 eŭroj; Individua Dumviva Membro 500 eŭroj; Kolektiva Membro 50 eŭroj; Juna Membro 16 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell,  
Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; vicprezidanto: Joan Inglada; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Anna Casasús, Xavier Margais, Arnald Massanas.

Kontrola Komisiono: Sebastià Ribes, Òscar Puig, Xavier Murcia.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Mateu Vic; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental),  
Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

# Nia agado

## KEA profesiigas sian strukturon

La estraro de KEA decidis dungi Josep Maria Milla ekde la 1a de januaro.

Tiel finiĝas la procezo komencita unue per la kolektado de kromkotizoj en la junia numero de *Kataluna Esperantisto* (ankoraŭ tre necesaj) kaj la anoncado de vaka laborposteno en la septembra. Sin anoncis kvar tre taŭgaj kandidatoj, kaj post funda konsidero pri la poroj kaj sedoj de ĉiu el ili la estraro elektis Milla. La estraro deziras publike danki ĉiujn kandidatojn pro ilia fido pri nia asocio.

La kataluna esperanto-movado jam spertis la profesiigon de sia strukturo: fine de la 1980aj jaroj, Centro de Esperanto Sabadell kaj Ĝirona Espero dungis po unu homon sinsekve (Hektor Alos kaj Arnau Torras, respektive Josep Virgili, Arnau Massanes). Du el ili membras nun en la estraro de KEA kaj antaŭvideble iliaj propraj spertoj helpas pli celtrafe uzi tiun novan forton. Grava diferenco estas, ekzemple, ke la animanto ne fariĝos membro de la plenumkomitato de la asocio kaj ke la estraranoj ne liberiĝos de taskoj transdonante ilin al la dungito. Male, li okupiĝos pri fakoj, kiujn la estraro, pro manko de fortoj, iom neglektis, nome pri la oftigo de la aranĝoj kaj la plivigligo de la informa fako.

Tamen la animanto laŭeble ne mem rekte engaĝiĝos pri la taskoj, sed klopodos aktivigi aliajn homojn kaj kunordigi ilian laboron: la estraro ne celas "liberigi" po 20 horojn semajne da laboro, sed laŭeble multoblige ilin. KEA restas malgranda asocio, kiu nepre devas baziĝi sur volontula, senpaga, libervola, altruisma laboro de sia membraro: ĝi neniam estos nek neniel celas fariĝi ministerio kun taskoj pelataj ekskluzive de salajrataj funkciuloj. Tamen profesiuloj pli bone certigas regulecon en la aktivado, evitante abruptajn ĉesojn de agadoj pro laciĝo, kaj tial permesas antaŭvidi pli ambiciajn, longedaŭrajn kaj laborpostulajn projektojn.

La taskoj atribuitaj al la animanto necesigas, ke li laboru en la sidejo de la asocio: tio povus esti oportuna, sed ne

esenca. Tial, por havi pli grandan elektablecon, la estraro difinis, ke nia profesia aktivulo laboru ĉe si, ĉar moderna teknologio tion permesas. En la kazo de Milla, li laboros en Mataró.

La dungado ekvalidos la 1an de januaro. Temo pri duontaga laborkontrakto, en la komenco por longo de trimonatoj. Fine de la jaro, se la sperto evidentiĝos pozitiva, surbaze same de objektivaj kiel de subjektivaj mezuroj, la kontrakto pluiĝos sen fina datlimo. Tio akordas kun la laborleĝoj, sed ankaŭ la estraro de KEA taksas tion tre konvena, ĉar se ĝi deziras lanĉi projektojn kun plurjara horizonto, necesas garantii laborstabilecon al nia dungito. Kompreneble finan vorton pri ĉiuj ĉi gravaj decidoj havas la Asembleo.

## Grava asembleo

La estraro de KEA kunvokas la membraron al la jara asembleo, sabaton la 14an de februaro je duono post la kvara en Amikoj de Unesko de Barcelono (Mallorca, 207, principal).



Josep Maria Milla i Saldon naskiĝis en 1965 kaj esperantistiĝis en 1985. Li estas el Mataró kaj tie loĝis preskaŭ ĉiam.

Li studis klasikan filologion kaj muzikon. Li ankaŭ akiris plurajn diplomojn kiel animanton de infanaj kaj junulaj grupoj. De tri jaroj li laboras kiel sociala edukisto en rezidejo por adoleskuloj de la kataluna registaro, kaj tiun triontagan okupon li dividos kun la duontagan enpostenigon en KEA.

Lia esperanta aktivado estas delonga. Multajn jarojn li estis kasisto de KEJ kaj ties respondeculo pri informado. Li ankaŭ kunredaktis la revuon *Frequències*. Post kelka tempo en la estraro de KEA, nuntempe li partoprenas en la projektoj Vilaweb Esperanto kaj ABC Pack. Krome li membras en la ensemblo Kaj Tiel Plu (fluto, mandolino, voĉoj kaj perkutiloj).

Li aktivas ankaŭ en la socia, politika kaj sindikata kampoj, kiel membro kaj aktivulo de diversaj organizoj.

Temas pri aparte grava kunveno pro la ŝanĝoj okazintaj dum la jaro 2003 en la asocio, kiujn oni ne antaŭvidis dum la pasinta asembleo. Nia asocio staras antaŭ gravega struktura transformiĝo postulanta pli multajn ekonomiajn rimedojn. Kiel ĉiuj saltaj kreskoj, ĝi samtempe prezentas allogajn defiojn: kaj grandajn eblecojn kaj konsiderindajn riskojn. En tia situacio, la estraro tre dankos la aktivan partoprenon de kiel eble plej multaj membroj por komune kunplani la estontan agadon.

### **Agrable, Prade**

Dudekkelkaj esperantistoj renkontiĝis en la t.n. 1a Esperanta Renkontiĝo de la “Somere de Sankta Marteno” en Prada de Conflent (Nord-Katalunio). La aranĝon rapide, memstare pretigis Mon Cardona, el Sants (Barcelono), kaj Kristian Pinard, el Prada, tial oni povis diskonigi ĝin nur tra Interreto.

Sabate la 8an de novembro, matene, kunvenis la partoprenantaro, vizitis la lokan foiron kaj piediris ĝis Sant Miquel de Cuixà preter la kanalo de Bohera. Post pikniko, la grupo vizitis la monaĥejon kun la sperta ĉiĉeronado de membro de la komunumo. Revene al Prada, oni haltis en la tombejo, kie i.a. kuŝas Pompeu Fabra.

Jam malhele oni aŭtis al la loĝejo, situanta trans Molig en la belega valo de rivero Castellana. Post abundega kampara vespermanĝo, oni babilis kaj karaokis esperante. Feliĉe, nek la nigra unuokula kato de la monaĥejo, nek la vizito de la tombejo, nek la plena luneklipso montriĝis malfavoraj, ĉar matene ĉiuj vekiĝis tutaj kaj povis promeni ĝis la apuda belega vilaĝo Mosset: la fajna pluveto ne sentiĝis kiel malagrable, sed eĉ emfazis la mirindajn aŭtunajn kolorojn de la pejzaĝo.



Post la adiaŭa, komuna tagmanĝo, al kiu aliĝis pluraj lernantoj de la esperanto-kurso en Prada, la grupo disiris atendente novan inviton de la dankinda organizanta duopo: venontfoje, eble en Puigcerdà.

### **Kursoj**

Ekis la kursosezono. Laŭ nia scio okazas kursoj en Centro de Esperanto Sabadell (elementa nivelo: kvar lernantoj), Amikoj de Unesko (elementa ciklo laŭ tri diversstupaj samtempaj kursoj: entute kvin lernantoj; sistematika kurso: kvar lernantoj; dua ciklo: du lernantoj; konversacia rondo: tri homoj), Barcelona Esperanto-Kontaktejo (kvar lernantoj) kaj Prada de Conflent (miksa nivelo: ses lernantoj).

Centro de Esperanto Sabadell kaj Barcelona Esperanto-Kontaktejo planas komenci mezan kurson en januaro aŭ februaro.

### **Pedagogia iniciato**

La lernantoj de la esperanto-kurso en Prada verkis prezento-tekstojn pri vilaĝoj kaj monumentoj de sia regiono, Conflent: Arboçols-Marcèvol, Cornellà de Conflent, Espirà de Conflent, Eus, Finestret, Jóc, Mosset, Rià, Sant Martí del Canigó, Taurinyà kaj Vallestàvia. Per kelkaj multediraj linioj ili trafis prezentas tiujn pitoreskajn lokojn. La rezulto estas bele ornamita de fotoj kaj afiŝita en la grupa TTT-ejo: [perso.wanadoo.fr/esperanto-conflent](http://perso.wanadoo.fr/esperanto-conflent). Imitinda iniciato!

### **Kongrese en Ceret**

La 32a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Ceret (Vallespir, Nord-Katalunio) de la 30a de oktobro ĝis la 1a de novembro.

La kongreso festos la centjaran jubileon de nia esperanto-movado, kies unuan nacian organizon, Aplec Esperantista de Catalunya, fondiis en Ceret Paul Berthelot en novembro 1904. Ankaŭ en Ceret estis eldonitaj la tri numeroj de la bulteno de la asocio, *Espero de Katalunjo*.

Kvankam oni antaŭvidas kelkajn prelegojn kaj la prezenton de jubilea libro pri la pionira esperanto-movado en nia lando, la kongrestemo ne estos dediĉita al

historiaj aferoj. Oni elektis paroli ĉefe pri “novaj kulturaj defioj”, t.e. pri la kultura buntigo de la landoj en nia regiono.

Jam akceptis partopreni nian kongreson Aleksander Korĵenkov, redaktoro de *La Ondo de Esperanto* kaj eldonisto de okdeko da libroj en kaj pri esperanto.

La aliĝilo estos distribuita kun nia venonta revuo, en marto.

### Preleolibro de Sóller



Fine de la jaro aperos la preleolibro de la kongreso de Sóller. Temas pri 68-paĝa libreto kuniganta tri prelegojn: “Malgranda estas bela, grava kaj interesa” de Josep Franquesa, “Lernado de fremdaj lingvoj: kiucele?” de Hektor Alos i Font kaj “Esperanto-teatro: kiam la kurteno leviĝos?” de Paul Gubbins. La libro finiĝas per la poemo “La Balkanikoj” de Albert Herranz Hammer, tradukita de Mateu Vic, Bàrbara Suau kaj Xavier Margais, kiun oni tre sukcese prezentis dum la kongreso.

La libro fariĝos la kvara Suplemento de Kataluna Esperantisto. Ĝuste, ankaŭ la antaŭa eldonaĵo de tiu serio, “Delfi Dalmau. Katalunismo, liberanismo kaj esperantismo” de Jordi Solé Camardons (tradukita de Xavier Rodon), estis prelego okazinta en kongreso, tiu de Figueres en 1997.

Ĝi estos samtempe publikigita papere kaj elektronike; tion zorge faros la eldonejo O Limaco Edicions, de nia kunmembro Ferran Marín, kiu antaŭe kreis la elektronikan eldonon de la esperanta-kataluna vortaro de Alòs kaj Carbonell.

### Esperanto en Vilaweb

La esperanto-rubriko de la kataluna reĵurnalo *Vilaweb* ekfunkcios januare.

La lanĉon de tiu iniciato jam anoncis la marta numero de nia revuo, kaj inter marto kaj aprilo jam ariĝis grupo de kunlaborantoj, sed teknikaj problemoj en *Vilaweb* kaŭzigitaj de ties rapidega kreskado malfruigis la aperon de la rubriko. Fakte jam antaŭ pluraj jaroj Òscar Puig klopodis ĉe Vicent Partal, la konata ĵurnalisto kaj kultura aktivulo estranta la ĵurnalon, por iela kunlaboro de KEA kun *Vilaweb*, sed la propono ne prosperis. Tamen, danke al la streboj de Manel Vinyals, kiu sukcesis tie publikigi pasintjare la raportojn de sia mondvojaĝo katalune kaj esperante, kaj la apero de la retinformilo *La Bulteno* de Barcelona Esperanto-Kontaktejo, redaktita de David Berga, la kontaktoj revigliĝis kaj fruktodonis.

**VILAWEB**  
DIARI ELECTRÒNIC INDEPENDENT

La estraro tutcertas, ke la membraro sentos tre rimarkindan ŝanĝon dum la jaro 2004 en la servoj kaj agado de la asocio, sed por plifirmigi tion varme invitas ĉiun, laŭ siaj ebloj, helpi la asocion:

Per la partopreno en la agadoj de la asocio, prelegoj, aranĝoj, kongresoj.

Per la abono de revuoj, mendo de libroj kaj aliĝo al kongresoj pere de KEA.

Per la kunlaboro en difinitaj laborgrupoj de la asocio: informado, rilatoj kun aliaj asocioj, organizado de aranĝoj, tradukoj al esperanto aŭ al la kataluna, korektado de tekstoj, redaktado de informiloj kaj dosieroj, ktp.

Per la transpreno de la respondeco pri difinita fak(et)o de la agado de nia asocio, eventuale aliĝante ankaŭ al la estraro de la asocio.

Per la okazigo de esperanto-kursoj aŭ aranĝoj en sia loĝloko (kun ĉia ebla kunlaboro de KEA).

Per memvola altigo de sia kotizo.

Dezirantoj bonvolu sin turni al [kea@esperanto-ct.org](mailto:kea@esperanto-ct.org) aŭ Apartat 1008, 08200 Sabadell.

Vilaweb estas la plej legata reĵurnalo en la kataluna, kun 910 000 vizitoj en septembro (660 000 januare). Ĝi havas dekojn da lokaj eldonoj kaj naŭ fakajn sekciojn. Krome ĝi gastigas plurajn gazetojn, i.a. *El Punt* kaj tre baldaŭ *El Temps*. Esperanto fariĝos la deka faka sekcio.

La enhavo de la rubriko, laŭ la stilo de la gazeto, konsistos el mallongaj novaĵoj. Ili ne nepre rekte rilatos al esperanto, sed okupiĝos ankaŭ pri la lingva diverseco kaj ekolingvistiko. Principe oni uzos la katalunan, kvankam esperanto povos esti de tempo al tempo uzita. Temas sendube pri la plej ambicia informada projekto de post la revuo *Frequències*.

Kunlaboremuloj estas tre petataj kontakti [kea@esperanto-ct.org](mailto:kea@esperanto-ct.org)

### **La interreta agado progresas**

En la marta numero, ni informis pri la sukceso de la TTT-ejo de KEA. Dum la jaro, oni alŝutis diversajn logilojn por kapti novajn vizitantojn. Tiel unu post alia alvenis *Kataluna Esperantisto*, la esperanta-kataluna vortaro de Alòs kaj Carbonell, la brazila aŭtodidakta komputila kurso kaj la reta eldono de la kvarlingva libro kontraŭ la milita defilado en Barcelono de 2000. La vizitoj kreskadis, kaj en la lastaj tri monatoj fariĝis po 70 tage (la pasintjara maksimumo ne atingis 40). La vortaro,

ekzemple, estis elŝutita 201 fojojn dum novembro, al kiu aldonendas 59 elŝutoj de la vortareto de Pedagogia Komisiono de KEA kompletigita de Joan Inglada. Bedaŭrinde la frontpaĝo de la TTT-ejo estis neglektita en la lastaj monatoj, kio signifas, ke eblas ankoraŭ multe progresi.

Aliflanke ankaŭ la retlisto viglas: dum la unuaj 11 monatoj de la jaro, oni sendis 729 mesaĝojn, kompare kun la 777 de 2002. Bedaŭrinde la partoprenantoj senteble fariĝis malpli variaj: entute 31 en ĉi tiu jaro kompare kun 33 de la pasinta, sed ĉefe du trionoj de la mesaĝoj venas el la du ĉefaj kontribuintoj, dum en la antaŭa jaro ili poŝtis 50%.

### **Pujulà i Vallès kaj Ferrer i Guàrdia**

Francesc Poblet publikigis en *Esquerra Nacional*, la revuo de ERC, resumon de sia esploro pri Frederic Pujulà i Vallès aperinta en la pasinta numero de nia revuo: ĝi okupas duonon de la antaŭlasta paĝo de la oktobra numero. Lastatempe Poblet sufiĉe aperigas artikolojn, kiel en *Lletres*, pri la historia memoro, kaj en Catalunya, organo de la sindikato CGT, pri Francesc Ferrer i Guàrdia – ĉi-okaze, sen aludoj al esperanto.

### **Gratulo pri artikolo**

Martí Guerrero aperigis en majo longan artikolon en *Xipreret*, bulteno de Ateneu de Cultura Popular de l'Hospitalet pri la lingva problemo en Eŭropa Unio, pligraviganta pro la baldaŭa aliĝo de 12 novaj landoj. La artikolo meritis laŭdon de Francesc Candel en la ĵurnalo *Avui* de la 8a de julio laŭdon, al kiu ni aliĝas.

### **Esperanto en L'Indépendant**

Raporto pri la renkontiĝo en Prada aperis en la ĵurnalo *L'Indépendant* el Perpinjano la 19an de novembro. Ĝi estis sendita de la loka aktivulo Kristian Pinard. Eble ne hazarde, post du tagoj samĵurnale la konata verkisto Pere Verdaguer aperigis artikolon, kie li memoras pri sia patro, i.a. pri lia esperantisteco.

Anonco pri la renkontiĝo aperis la 7an de novembro en la reĵurnalo *Vilaweb*, danke al la informa agado de David Berga kaj Barcelona Esperanto-Kontaktejo.

### **Eŭropa kongreso en Bilbao**

La 6a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso okazos en Bilbao sub la aŭspicio de Eŭropa Esperanto-Unio inter la 25a kaj 29a de aŭgusto 2004. La kongresa temo estos "Eŭropa unuiĝo: Esperanto por multlingva mondo".

Ne nur lingva politiko estos en la programo. La kongresa semajno estos plenplena de eŭskaj muziko kaj lingvo, teatraĵo, ekskursoj boate ĝis Portugalete, vizitoj al la Muzeo Guggenheim kaj promenadoj tra Bilbao kaj ĉirkaŭaĵo, pacmuzeo. Eĉ la eŭska parlamento malfermos siajn pordojn por esperantistoj.

Jam pli ol dek jarojn okazas eŭropaj esperanto-kongresoj, laŭ iom neregula sinsekvo: Verono (1992), Parizo (1995), Stutgarto (1997), Ostendo (2000) kaj denove Verono (2002). Temas pri granda evento, certe partopreninda.

Interesitoj povas aliĝi pere de KEA, kiu fariĝis oficiala peranto de la aranĝo.

[www.geocities.com/esperantobilbao](http://www.geocities.com/esperantobilbao)

## **Intervjuoj al Xavier Rodon kaj al Hektor Alos**

Danke al la klopodoj de la senlaca aktivulo Eugeni-Lluís Batalla, la revuo *La Canya*, el Maresme, multnombre distribuita senpage tra la regiono, publikigis lastpaĝe intervjuon kun la ekssekretario de KEA Xavier Rodon. Apud grandega foto, li parolas pri esperanto rimarkante ĝiajn ĉefajn trajtojn.

Aliflanke, Ràdio Castelldefels telefone intervjuis la nunan KEA-sekretarion, Hektor Alos, mardon la 18an de novembro iom post la sesa kaj duono vespere dum kvaronhoro.

kb/red



## **Eŭropa Socia Forumo**

La kontraŭtutmondistoj renkontiĝis en Parizo de la 12a ĝis la 15 de novembro. La 2a Eŭropa Socia Forumo daŭrigis la diskutojn de la jamaj tri Mondaj Sociaj Forumoj de Porto Alegre kaj la 1a Eŭropa Socia Forumo pasintjare en Florenco. Ankaŭ esperantistoj sufiĉe viglis tie, por esti rimarkitaj de la amaskomunikiloj. Ĵurnalo *Avui* en sia raporto de la 15a de novembro uzas kiel subtitolon “la aranĝo kunvenigas de esperantistoj ĝis fenestro-rompantoj”, per kiu la ĵurnalo fakte reeĥas esprimon uzitan de la franca *La Tribune*. La sekvan tagon ankaŭ *El Mundo* menciis esperanton, same kiel la aliaj gazetoj, kiel unu el la plej okulfrapaj ekzemploj de la heterogeneco de la kontraŭtutmondisma movado.

La Eŭropaj Sociaj Forumoj tamen ne uzas esperanton: laborlingvoj estas la franca, la angla, la germana, la itala, la hispana kaj la internacia signolingvo. Milo da volontulaj tradukistoj provizas tradukojn en kaj de multaj lingvoj, ĉar ĉiu partoprenanto rajtas uzi sian lingvon.

fp/dr/red

## **Per esperanto en Japanio**

Josep Franquesa, prezidanto de KEA, vizitis Japanion kun sia edzino dum tri semajnoj de oktobro kaj novembro. Li sinsekve estis en Osaka, Hirakata, Nagoya, Nemuro, Kitami, Yamagata, Tokio, Hiroshima, Kokura, Nagasaki kaj denove

Osaka laŭ densa agendo: li trafis sep aviadilojn, tri kuglotrajnojn, du aŭtobusojn laŭlonge de 3500 kilometroj. En ĉiu urbo lin bonvenigis esperantistoj, kiuj rolis kiel interpretistoj, kiel kutime en liaj negocaj vojaĝoj. La vojaĝo efektive estis tia, sed ne nur: la urboj Lleida kaj Yamagata pretigas ĝemeliĝon (ambaŭ estas centroj de frukto-regionoj), kaj en tiu procezo esperanto rolas ponte. Franquesa kunportis leteron de la urbestro de Lleida por lia samrangulo en Yamagata. Aliflanke en la urbo Nemuro, en la nord-orienta ekstremo de la insulo Hokajdo, li prelegis esperante pri Katalunio en lernejo kun traduko al la japana. Poste lia edzino pretigis manĝon ĉirkaŭite de la lokaj ĉefkuiristoj. La menuo ne povis esti pli tipe kataluna: pano kun tomato kaj ŝinko, terpoma omleto kaj kaserola rizo.

*Josep Franquesa prelegas pri Katalunio en Hokajdo*

Josep Franquesa, kiel li rakontis en la kongreso de Sóller, delonge rilatas kun Japanio: danke al japanaj esperantistoj, li venigis en nian landon la unuajn spertulojn pri seksdistingado de unutagaj kokidoj, per kio li starigis sian unuan entreprenon. Lia prelego estos eldonita ĉi-monate en la preleolibro de la kongreso.

## **Interesa malkovro**

Kadre de siaj esploroj pri la Enlanda Milito en Bunyola (Majorko), historiisto Xavier Margais malkovris interesan respublikisman afiŝon, kiu estis ekspoziciita en Laborista Centro antaŭ la milito. Ĝi iel



ideale reprezentas estontecon kaj aparte estas interesa pro la tri flagoj videble flirtantaj: la hispana, la laborista kaj la esperanta. Komprenoble post sia diskonigo per Interreto, la afiŝo fulmrapide disvastiĝis en la plej progresemaĵoj rondoĵoj de la iberiaj esperantistoj.

### Manuel Casanoves en TV3

Okaze de la 25-jariĝo de la hispana filio de Amnestio Internacia, TV3 mallonge intervjuis Manuel Casanoves i Casals, la unuan hispanian membron de la organizaĵo, unuan prezidinton de la kataluna filio de AI kaj ankaŭ unuan prezidinton de KEA. La novaĵo aperis en tagmeza informilo de TV3, jaŭdon la 27an de novembro.

lp/red

### Novaj libroj de Montagut kaj Seabra

Aperis *La enigmo de l' ar@neo*, junulara detektiv-romano de Abel Montagut. Ĝi estas la esperanta versio de la katalunlingva *L'enigma de l'arany@*, eldonita en 2000. Oni antaŭvidis ĝian prezenton ĉi-somere, sed eldon-eraro malfruigis la surmerkatiĝon dum kelkaj monatoj.

Apenaŭ kelkajn semajnojn antaŭe aperis alia junulara detektiv-romano de Montagut, ĉi-foje en la kataluna: *El manuscrit de Jules Verne*. En ĝi ĉefrolas la sama juna skipo de enketistoj. Kvankam la verko eksplicite mencias nur foje esperanton, verduloj tuj kaptos aludojn kiel iun asocion Solidaires Avec Tous (SAT) situantan ĉe 67 avenue Gambetta en Parizo, kie okazas la esplorata krimo.

Siaflanke, Manuel de Seabra publikigis en la portugala *Odiai-vos uns aos outros*, malfacile klasifikeblan verkon, iaspecan kombinon de aŭtobiografio kaj novelaro rapide kaptantan la atenton de la leganto. Espereble baldaŭ legebla en la esperantlingva originalo.

Montagut, A. *El manuscrit de Jules Verne*, Barcanova, Barcelono, 2003. ISBN 84-489-1213-6

Montagut, A. *La enigmo de l'ar@neo*, IEM, Vieno, 2003. ISBN 3-01-000030-8

Seabra, M. de. *Odiai-vos uns aos outros*, Escritor, Lisboa, ISBN 972-8590-70-9.

### Ibera numero de Fonto

La literatura revuo *Fonto* aperigis iberan numeron en aŭgusto. Krom la kvazaŭ enkonduka mallonga novelo de Liven Dek, la cetero estas tradukoj. Jorge Camacho elhispanigas poemojn de Octavio Paz, Josep Maria Fonollosa kaj Jaime Gil de Biedma kaj mikrorakonton de Alfonso Sastre. Joxemari Sarasua premiere prezentas novelon el Pío Baroja aperontan en la oka volumo de la libroserio "Hispana Literaturo". Ankaŭ Abel Montagut montras ereton de eldonota libro, nome tradukon el klasika ĉina poemo anonima, aperonta en sia romano *La enigmo de la araneo*. Plej longan unupecan kunlaboraĵon konsistigas la traduko de la novelo "Thomson, Braun, Corberó, Philishave..." de Quim Monzó fare de Hektor Alos i Font.

### Politike en Monato



Hektor Alos publikigis opinionan artikolon en la oktobra numero de ka magazino *Monato* pri la rezultoj de la malleĝigo de Euskal Erritarrok en la lastaj municipaj balotoj. La aŭtoro

jam iom regule prikomentas la eŭskan situacion en la revuo, kvankam ne ĉiuj aprobas liajn taksojn, laŭ oni povas legi en la rubriko *Leteroj*, entenanta la opiniojn de la legantoj.



# Internacia pakportalo en esperanto

## Intervjuo al Manel Vinyals, iniciatinto

### ➤ *Venas de la frontpaĝo*

*Ĉu vi povas iom klarigi pri kio temas la tuta projekto?*

Temas pri retportalo pri enujigo kaj pakado. En ĝi ĉiu povas senpage konsulti enciklopedion pri terminoj, uzoj, materialoj kaj aplikadoj. Se mankas informo, eblas ankaŭ senpage konsulti fakulon. Krome ĉiutage, kiel en ĉiu portalo, aperas novaĵoj pri la sektoro. La portalo estas plurlingva: ĝi aperis jam en la hispana, angla kaj esperanto. Ĝi krome estas internacia: ekzistas konsultistoj sudafrika, israela... La fako estas tre ampleksa, kaj neniuj ĉion scias.

*Nu, se ĉio senpagas, kie estas la gajno?*

Fakte, ne ĉio estas tia. Parto de la portalo enhavas liston de entreprenoj, kiuj anoncas sin. Tiuj entreprenoj ja pagas. Aliĝi al la registro de liverantoj en du el la ses fakoj, en kiu oni dividis la sektoron, kostas 180 eŭrojn; aliĝi al ĉiuj, 350 eŭrojn. Krome ekzistas aliaj prezoj por pli videblaj reklamoj. Nuntempe oni kalkulas, ke investado por atingi unu komercan kontakton postulas 200 eŭrojn: unu sola kontakto en la jaro sufiĉas por pravigi la investon.

*Do, la ŝlosilo por la sukceso de la entrepreno kuŝas en la atingado de tiuj entreprenoj sin reklamantaj?*

Fakte, ne. La sukceso ĉefe dependas de la aliĝo de sufiĉe multaj uzantoj. Se ni atingas uzantojn, ne estos malfacile altiri reklamantojn.

*Kiel ĉio ĉi rilatas al esperanto? Ĉu vere vi kalkulas, ke ĝi alfluigos sufiĉajn homojn por pravigi la uzadon de la lingvo?*

Esperanto funkcias parte kiel punta lingvo en la tuta projekto: ni volas aliri landojn, kie la angla ne estas tre disvastiĝinta, kaj granda parto de niaj internaciaj kontaktoj



*Manel Vinyals (maldekstre) kaj Joaquim Marcoval (dekstre) en Samarkando dum ilia mondvojaĝo*

estas esperant-lingvaj. Tial la tekstoj devas esti en esperanto. Ni ŝatus uzi la internacian lingvon ankaŭ kiel pontolingvon en la konsultoj: ekzemple iranano povas starigi demandon respondotan de hebrelingvano; necesas interlingvo, ĉar nia konsultisto ofte ne scipovos la lingvon de la demandinto.

Sed, pli grave, la traduk-servo estos centrigita: ĉiu novaĵo kaj ĉiu nova enhava ero iros de la kreanta lando al la centro en esperanto. Nia traduk-servo resendos ĝin al ĉiu nacia oficejo, por ke oni traduku ĝin al alŝutu en sian TTT-ejon. Tiamaniere ĉiun novaĵon el kiu ajn parto de la mondo miloj da homoj povos koni en unu semajno. Ni tre interesiĝas pri la uzo de aŭtomataj tradukiloj, sed bedaŭrinde Elitrad, ŝajne la sola disponebla en esperanto, estas tro elementa kaj ne taŭgas por nia celo.

Fakte nuntempe la enirpaĝo de la portalo estas la hispana, sed ni antaŭvidas krei frontpaĝon kun mapo, kie ĉiu uzulo elektos sian lingvon.

*Vi diris, ke la funkciado kiel ponta lingvo estas nur parto de la rolo de esperanto en la projekto. Kio plia, do?*

Fakte mi devas malkaŝi, ke la kerna ideo de tiu projekto estis de iu mia amiko. Li planis ĉion funkciigi en la angla kaj kalkulis, ke necesos 500 000-eŭra investo. Mi diris al li, ke mi kredas ĝin ebla nur kontraŭ 60 000, sed uzante la esperantan reton: starigi firmaon en Ĉinio, ekzemple, postulas grandan monsumon kaj sperton pri la lando, sed la esperanto-movado jam tie funkcias, havas ejojn kaj komercas; la investoj draste reduktiĝas. La tuta ideo de la portalo baziĝas en la uzado de ĉiuj sinergioj de la tutmonda esperanto-movado kaj ties lokaj oficejoj, kiuj ĝuste laŭ mia vidpunkto plej gravas, ke ili estu fortaj kaj viglaj.

*Tio ŝajnas sufiĉa kialo por uzi esperanton en la projekto. Kiel rigardas al la afero viaj kuninvestantoj, kiuj ja ne estas esperantistoj?*

Ili konas esperanton kaj fidis pri la projekto. Ili scias, ke en la mondo estas multaj esperantistoj petantaj pri komercaj projektoj en esperanto. ABC-Pack povas esti grava ideo en tiu senco, sed mi certas, ke poste naskiĝos aliaj projektoj.

*Fakte, se mi bone komprenas, esperanto utilas por aliri unualoke la merkatojn ĉinan kaj iranan, sed por tion efektivigi necesos traduki la portalon al la ĉina kaj al la persa. Konkrete, kiel funkcios la diversaj landaj filioj de la projekto?*

Por ĉiuj taskoj pri tradukado, akualigo de la TTT-ejo kaj serĉado de enhavoj kaj reklamoj en ĉiu lando, ABC Enciklopedioj pagos 40-procentan makleraĵon por la reklamoj venintaj el la koncerna lando kaj 10-procentan por ĉiuj reklamoj ricevitaj el aliaj landoj. Se la lando malhavas traduk-servon kaj propran TTT-ejon, la provizio

estos 30% de la atingitaj reklamoj. Tiuj monsumoj povas fariĝi tre gravaj por la vivo de la lokaj esperanto-societoj.

*Kaj, mi scivolemas, kial specife portalo pri pakado?*

Fakte, pakado estas mia fako, ĝin mi plej bone konas kaj havas kontaktojn, tial ĝi estas bona deirpunkto. Tamen, se la afero montriĝas sukcesa, ni jam fondis la entreprenon "ABC Enciklopedioj" (tiel registrita, en esperanto) kaj antaŭvidas disvastiĝi al aliaj fakoj. Ni jam interkonsentis pri fruktoportalo principe lanĉota en 2005. En tiu okazo, la diversaj delegacioj devos dungi spertulon, kiu estos la fakon en ĉiu lando. Sed se ĉio bone marŝas, la afero ne restos nur ĉe pakado kaj fruktoj: ni antaŭvidas ankaŭ meblojn kaj multajn aliajn.

*Nu, kiaj estas viaj financaj planoj? Kiam vi scios, ĉu vi gajnis la veton aŭ ne?*

Mia sperto kiel entreprenisto montras al mi, ke en du jaroj oni scios, ĉu la afero sukcesis aŭ ne. Fine de 2004 ni antaŭvidas pli-malpli kvitiĝi kaj en 2005 la firmao jam devus esti profita. Fakte la interkonsento kun KEA por tradukoj estas por tiu du-jara provperiodo.

*Jes, kaj ni same kiel vi tre interesiĝas pri la sukceso de la entrepreno. Kiel fakte leganto de nia revuo povus kontribui?*

Kiel mi diris, la esenca punkto en la veto estas atingi sufiĉe multajn uzantojn. En tio, la diskonigo de la portalo estas esenca. Se iu havas rilaton kun ebla uzanto, nepre informu lin. Aliflanke, ni petas al ĉiuj esperantistaj asocioj en la mondo: fariĝu delegitoj de ABC Enciklopedioj kaj helpu nin en tiu projekto. Ni, ĉiuj, bezonas unu-du jarojn da laboro kaj mi certigas, ili rezultos tre fruktodonaj. Informiĝu ĉe [info@abc-pack.com](mailto:info@abc-pack.com).

Ses-kapa skipo tradukas la tekstojn de la portalo ABC-Pack. Du homoj okupiĝas pri la enciklopedia fako, dum tri aliaj esperantigas la ĉiutage aperantajn novaĵojn de la portalo; la sesa, revizias kaj parte kunordigas. Temas pri longterma, regula laboro. Kunlaboremuloj bonvolu sin turni al [kea@esperanto-ct.org](mailto:kea@esperanto-ct.org)



La 300-paĝa taglibro "Amb l'esperanto a la motxilla" de Vinyals kaj Marcoval, en kiu ili rakontas siajn spertojn dum 79-taga vojaĝo ĉirkaŭ la mondo sen avidiloj kaj per esperanto, estas fintradukata al esperanto en tiuj tagoj de Hektor Alos. La esperantigo baziĝas sur la kronikoj aperintaj en Vilaweb dum la vojaĝo, kiujn diligente tradukadis al esperanto Llibert Puig, kaj kiuj poste fariĝis la vertebraro de la verko, kvankam ili tre konsiderinde ŝveliĝis en la libro. Menciendas, ke ankaŭ Karles Berga tradukas parton kaj Josep Virgili revizias la tuton. La libro estos presita en Ĉinio, kaj pretos por la julia Universala Kongreso en Pekino.

## Interreta rubriko

Aperis paĝo pri Andoro kaj Katalunlingvio, kreita de la andora esperantisto Gerard Escuer i Parramona. La interesa enhavo aperas en kataluna kaj esperanta lingvoj, kun belegaj fotoj de andoraj pejzaĝoj:  
[www.geocities.com/geppcc](http://www.geocities.com/geppcc)

La portugala verkisto Gonçalo Neves, membro de la fama Ibera Skolo, starigis propran "blogon", t.e. retan taglibron. La legado de la ĉiutagaj artikoloj de nia iberia samideano estas frandaĵo tre rekomendinda:  
[periskope.blogspot.com/](http://periskope.blogspot.com/)

Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en esperanto, 1887 - 2002, kun 1079 titoloj, kaj Esperanto-terminaroj 1980 - 2002, troveblas en:  
[uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html](http://uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html)

Kontakto.info proponas diversajn servojn: anoncojn, informojn, kontaktojn personajn, kulturajn kaj profesiajn, en pluraj

lingvoj inkluzive de esperanto:  
[www.kontakto.info/index-eo.html](http://www.kontakto.info/index-eo.html)

Eblas uzi jenan serĉilon por trovi menciojn pri esperanto en la tutmonda ĵurnalaro:  
[www.worldnews.com](http://www.worldnews.com)

Jen interesa, vortara, esperanta programo. Post la instalo oni povas elŝuti esperanto-vortaron en 22 lingvoj, i.a. la kataluna:  
[welcome.to/vortaro](http://welcome.to/vortaro)

La jena rekomendinda paĝo de Roel Havelman havas plurajn ligilojn al esperantaj vortaroj  
[www.tekstoj.nl/esperanto/tradligoj.htm](http://www.tekstoj.nl/esperanto/tradligoj.htm)

La Departamento de la Naturmedio kaj Heredaĵaro de la aŭstralia registaro prezentas enkondukon al la Aŭstralia Nacia Botanika Ĝardenaro en la lingvoj angla, franca kaj esperanto, ĉe:  
[www.anbg.gov.au/anbg/index.html](http://www.anbg.gov.au/anbg/index.html)

Darío Rodríguez

## Lingva angulo

Ofte, la vorto “subjunktivo” instigas al debato. Ekzemple, Plena Ilustrita Vortaro difinas: “Subjunktivo. Verba modo **ne ekzistanta en esperanto** ...” (mia rimarko). Alia ekzemplo: (diri, ke la finaĵo de la esperanta subjunktivo estas u) havas grandan meriton, des pli grandan, ke subjunktivo... **ne ekzistas en esperanto.**” (A. Cherpillod, *Heroldo de Esperanto*, 2003, numero 9, paĝo 3, liaj rimarkoj). Mia deziro estas skizi analizon pri diversaj aspektoj de la debato kaj tiel proponi kondiĉon por nova solvo. Mi resumas la tuton jene:

A) La enhavo de la vorto “subjunktivo” varias laŭ la diversaj lingvokulturoj;

B) La esperanta u-formo kongruas kun parto de kelkaj “subjunktivoj” (sed ne kun aliaj!);

C) La tro simpligita esprimo “subjunktivo ne ekzistas en esperanto” ne estas kontentiga: akceptebla solvo por ĉiuj devus rekoni la veron de B.

La unua parto de la aserto B estas facile pravigebla per ekzemplo. Zamenhof tradukis la Bibliion el la hebrea originalo en

esperanton. Ni prenu la frazon “Li sendu el la ĉielo kaj helpu min ...” (La Psalmaro, 57:3); tiu sama verko estis rekte tradukita en la katalunan “Que envii des del cel qui em salvi...” (versio de la monaĥoj el Montserrat). En tiu ĉi rakonto la kataluna lingvo uzas (dufoje) subjunktiv-formon kaj Zamenhof u-formon. Simile okazas se temas pri la kastilia (hispana) lingvo: “Yo te tomé de la majada, de detrás de las ovejas, para que fueses príncipe de mi pueblo, de Israel” (II. Samuel, 7:8, versio Nácar-Colunga). Tre klara subjunktivo. Zamenhof tradukis: “Mi prenis vin el ŝafejo, de ŝafoj, por ke vi estu estro super Mia popolo Izrael”.

Oni povas nei la rajton de tiu “vorto” en nia lingvo; tamen, en instruado, kaŝi la aferon ne evitos la influon de la patrino lingvo super esperanto nek la antaŭvideblajn erarojn de la lernantoj. Tial, estus bone revizii la aferon racie kaj sen antaŭjuĝoj, kun konsidero al la diversaj lingvoj kaj ellabori novan skemon en esperanto, almenaŭ por la bono de lernado.

Ramon Perera

# Abonu viajn revuojn!

**KEA peras konsiderindan nombron da esperanto-revuoj, kredeble la plej interesajn. Ni listigas ilin laŭteme.**

## **Movadaj**

La revuo Esperanto estas la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi enhavas artikolojn pri la movado en diversaj landoj, pri kongresoj kaj pri movada strategio. Ĝi informas ankaŭ pri novaj libroj en Esperanto, ofte kun recenzo. 11 x 24 paĝoj, preskaŭ A4. 34 eŭroj. (KEA peras ankaŭ la membrotizojn de UEA: membro-abonanto kun Jarlibro, 54 eŭroj)

La Ondo de Esperanto estas bonege redaktata internacia forumo de raportoj kaj opinioj el diversaj tendaroj de esperantismo. Ĝi enhavas ankaŭ literaturajn kaj kulturajn paĝoj kaj tre elstaran skipon de regulaj kunlaborantoj. Rusio, 12 x 20 p. A4. 25 eŭroj.

Heroldo de Esperanto estis transprenita en 1997 de Kooperativo de Literatura Foiro, kaj de tiam fariĝis la podio de ĝia tre aparta formo koncepti esperantismon. 16 x 4 p. A3. 32 eŭroj.

Eventoj, la plej ofta movada periodaĵo, ĉesis aperis kiel papera gazeto, tamen restas la vigla retroŝta informservo Ret-Info. 19 eŭroj.

## **Pedagogiaj**

Kontakto estas la porjunulara magazino eldonata de TEJO. Ĝi ne enhavas artikolojn pri la esperanto-movado, sed pri la mondo kaj vivo, kvankam ne pri aktuala politiko. Precipe por junuloj kaj lernantoj. Kelkaj artikoloj en facila esperanto, kun uzo de nur la 520 aŭ 1000 plej oftaj vortoj de la lingvo. 6 x 16 p. A4. 19 eŭroj.

Komencanto estas revuo por ĉiu, kiu lernas, posedas aŭ instruas esperanton. Speciale taŭgas por kursoj, grupoj, societoj. Enigmoj kaj konkursoj, kaj ankaŭ artikoloj el diversaj landoj pri la lingvo, la literaturo, la movado kaj ties historio. 6 x 16 p. A4. 15 eŭroj.

Juna Amiko. Por lernejoj kaj aliaj lernantoj (kaj ties gvidantoj). Rakontoj, ludoj, ekzercoj kaj artikoloj pri la historio de la esperanto-movado. 4 x 28 p. A5. 12 eŭroj.

Internacia Pedagogia Revuo estas la revuo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj enhavas raportojn kaj artikolojn pri la instruado de esperanto. 4 x 40 p. A5. 15 eŭroj.

## **Aliaj**

Monato estas magazino sendependa, kun raportoj, artikoloj kaj debatoj pri politiko, ekonomio, kulturo, turismo kaj ĉiaj aferoj de la moderna vivo. Unika revuo en esperanto kaj tre rekomendinda. 12 x 32 p. A4. 38 eŭroj.

La Jaro estas poŝkalendaro de *Monato*. ĉ. 80 paĝoj, A6. 5 eŭroj.

La Kancerkliniko sin taksas "ajnista" kaj "skandalema". Ĝi entenas riĉan kaj tre varian enhavon de noveloj, poemoj, bildstrioj. Ĝi estas socie kaj politike engaĝita kaj ankaŭ prikomentas novaĵojn de la esperanto-mondeto. Abono por kvar sinsekvaj numeroj + kromnumero (plej ofte literatura). 4 x 24 p. A4. 20 eŭroj.

Etnismo estas la organo de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj. Ĝi enhavas detalajn artikolojn pri minoritatigitaj popoloj tra la mondo. 2-3 numeroj, sume 36 p. A4. 10 eŭroj.

Scienca Revuo estas la organo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj enhavas fakajn artikolojn pri plej diversaj sciencoj. 4 x 30-40 p. A5. 20 eŭroj.

La Gazeto estas kultura revuo, ĉefe, sed ne nur, pri la esperanta. Ĝi precipe okupiĝas pri historio kaj literaturo, kaj aparte atentis pri recenzoj. 6 x 32 p. Pli-ol-A5. 27 eŭroj.

Fonto estas beletra revuo aperiganta tradukajn kaj originalajn poeziojn kaj prozaĵojn, sed tre malmultajn recenzojn. 12 x 36 p. A5. 34 eŭroj.

Literatura Foiro estas la organo de Kooperativo de Literatura Foiro. Ĝi estas principe kultura revuo kun tre interesa enhavo, grandparte literatura sed ne nur. Kiel organo de LF-Koop, ĝi enhavas ankaŭ multajn artikolojn laŭ ties vidpunkto. 6 x 56 p. A5. 30 eŭroj.